

F

Eugène FAILLETAZ

1873-1943



Travivinte sian junaĝon en farmdomo ĉe Essertines-sur-Rolle/VD, en 1889 F. transloĝiĝis al Laŭzano, kie li kleriĝis kaj aktiviĝis kiel lernanto pri komerco i.a. en la Laŭzana kredit- kaj ŝparbanko. En 1892 li aliĝis kiel komitatano al la Societo de la junaj komercistoj, en 1894-95 li estis ĝia prezidanto kaj dek jarojn redaktis ĝian organon *Le Commercant*. En 1901 li fariĝis sekretario kaj en 1912 prezidanto de la Industria kaj komerca societo de Laŭzano, poste li estris ankaŭ la Vaŭdan Union de komerco kaj industrio kaj la Vaŭdan komercan ĉambron. Por la Svisa agrikultura ekspozicio en Laŭzano li laboris kiel kasisto (1910). En 1916 F. iniciatis la unuan Vaŭdan specimenan foiron en Laŭzano kaj en 1919 ekfunkciigis la Svisan Industriaran Oficejon (poste OSEC). En 1920 la romanda komerca pioniro kreis kaj ĝis 1942/43 prezidis la Svisan Foiron pri nutraĵ- kaj agrikultur-industrio (franclingve: Comptoir Suisse) en Laŭzano. Sed F. havis ankoraŭ multajn aliajn gravajn taskojn, i.a. en la pedagogio kaj politiko: Li estis konsilanto de la komerca lernejo

kaj prezidanto de la lerneja konsilio (ĝis 1943). En la politiko li rolis kiel radikala deputito en la vaŭda granda konsilio (1917-41), kiel reprezentanto (préfet substitut) de la laŭzana prefekto (1928-43) kaj kiel kunlaboranto de la Svisa Societo pri kontrolado de la navigado sur Rodano kaj Rejno. F. estis honora membro de la Asocio de la laŭzanaj komercistoj kaj portis kelkajn medalojn, i.a. la Akademiajn Palmojn, la Honoran Legion de Francio (1928) kaj la Leopoldan Ordenon de Belgio.



Eugène Failletaz (dekstre)

La disvastiĝo de la tutmonda komerco kaj la pli viglaj internaciaj rilatoj komence de la 20a jarcento supozeble kaŭzis la interesiĝon de F. pri la neŭtrala universala lingvo. La *unua nomaro de l'esperantistoj* aperinta en *Svisa Espero* 2/1903 menciis i.a. F. en Laŭzano inter la novaj adeptoj de la Eo-movado. En 1903 li akceptis esti la unua prezidanto de SES, sed ne por longa tempo, nur ĝis 1904. Post lia demisio de la prezidanta ofico pro profesiaj kaŭzoj, *SE* laŭde skribis pri F. jenen: „F. ĉiam estis prezidanto bone konsilanta kaj gvidis lerte la unuajn paŝojn de l'juna SES.“ Tial SES elektis lin honora membro. Krome F. subtenis la agadon de →Hans Joachim Unger, redaktoro de *Internacia Komercia Revuo*, cele al la rapida disvastiĝo de Eo en la komerco.

→Svisa Esperanto-Societo →Vaŭdo →Politiko

FAMILIOJ ESPERANTISTAJ

Laŭ iu difino Eo-Fn. formas a) geedzoj aŭ kunvivantoj, kiuj uzas Eon inter si, b) gepatroj de respektive kun denaskaj parolantoj de Eo; aŭ pli simple: Eo-familio estas familio, en kiu almenaŭ du membroj normale uzas inter si Eon. Ekzistas F. en kiuj nur la gepatroj aŭ la gepatroj kaj ties infanoj estas aktivaj e-istoj. Ekzistas F., en kiuj la infanoj komprenas Eon, sed ne aktive uzas ĝin. Ekzistas F., kiuj ne havas proprajn infanojn, sed kies parencoj uzas Eon ktp. En iuj kazoj infanoj konsideras aŭ deklaris sin denaskaj e-istoj (uzante Eon aŭ ne), aliaj ne adoptis la denask-modelon. En Svislando la Eo-movado konas plurajn ekzemplojn de unu aŭ alia tipo de Eo-familio.

Unu el la plej fruaj svisaj e-istoj, →*Alfred Paul Dubois* (+1918) en Le Locle/NE, havis filinon, kiu uzis Eon en stenografio, kaj fraton, →*Henri Dubois* (+1919), kiu estis la fondinto de la EG La Stelo en Ĝenevo; ĉi tiu siavice estis apogata en sia Eo-aktiveco de siaj filo kaj filinoj - lia filino Stelle apartenis al La Stelo dum pli ol 50 jaroj.

En Le Locle/NE kaj Les Brenets/NE ankaŭ →*Edouard Ducommun* (+1951) instruis Eon al sia familio, kun kiu li entreprenis la plej diversajn libertempajn aktivecojn.

En la neŭŝatela kantono la fratoj →*Georges* (+1943) kaj *Hermann Stroele* (+1921) kaj →*Jean* kaj *Jules Borel* estis elstaraj, eĉ internacie konataj e-istoj. En Laufen →*Friedrich Schneeberger* (+1926) kunlaboris kun sia frato Paul Schneeberger. La tiĉin-devenaj fratoj *Cezaro* (+1950) kaj *Reto Rossetti* (+1994), ambaŭ talentaj Eo-verkistoj, siatempe migris el Svislando al Skotlando.

→*Wilhelm Haase* (+1969), la ĉefa loka aktivulo en Burgdorf/BE, antaŭ la unua mondmilito konatiĝis kun sia edzino Klara Meister (+1968) pere de la EG en Hasle-Rüegsau/BE; ŝi ankaŭ fariĝis fidela e-istino.

En Bazelo ekzistis du e-istaj paroj: *Hermann Schmutz* (+1993) kaj lia edzino *Jeanne Saenger* (+1982) vaste uzadis Eon por siaj vojaĝoj kaj internaciaj kontaktoj, same *Samuel Leuenberg* (+1964) kaj Ida Burkhard (+1959).

En 1911 →*Edmond Privat* (+1962) edziĝis en La Chaux-de-Fonds/NE kun la franca e-istino Angèle Fallot. En 1926 ili divorcis. Poste

Privat edziĝis kun *Yvonne Bouvier* (+1977). Ankaŭ Yvonne restis aktiva e-istino, same kiel ŝia frato *Paul Bouvier* (+1974).

La unua edzino de la ĝeneva esperantologo →*Henri Vatré* (+1998) estis la Eo-poetino *Juliette Baudin* (+1937). El Ĝenevo devenis ankaŭ la konata Eo-paro →*Ardachès Stakian* (+1998) kaj *Madeleine Vuille* (+2004).

La sviso →*Joseph R. Scherrer* (+1967), kiu migris al Usono, havis edzinon, Helen A. Scherer (+1985), kiu estis e-istino; ilia filino Heleno-Heidi (*1945) estas denaska e-istino.

La motoroj de la EG en St. Gallen estis la geedzoj →*Hans Kürsteiner* (+1968) kaj Anna Strübi (+1968), poste →*Karl Reutemann* (+1979) kaj *Lina Klee* (+1993).

→*Heidi Sallenbach* (1916-2006) kunlaboris kun sia edzo →*Arthur Baur* (*1915) en diversaj Eo-aktivecoj, precipe en la pretigo de radioprelegoj por SRI. Ankaŭ la infanoj de tiuj zurikaj ĵurnalistoj lernis Eon, en la aĝo de dek jaroj. Dum la filo neniam fariĝis aktiva e-isto, la filino Irène Thomann-Baur praktike uzadis Eon en diversaj okazoj.

En Zuriko longe agadis por Eo ankaŭ la geedzoj *Arthur Edmund Kuder* (+1973) kaj Helen Mateffy (+1976), →*Fritz Liechti* (+2001) kaj Hanny Kilchhofer (+1999), →*Werner Laederach* (+2002) kaj Martha Emmes, kies filino ankaŭ iom partoprenis la Eo-vivon. Membroj de la zurika Eo-komunumo krome estis →*Maurizio de Sassi* (+1997) kaj ties edzino Helen Reber (+1996). Tra la Eo-movado Ines Ponzino (+2002) akompanis sian edzon →*Hans Hunkeler* (+2000), e-isto en Aarau; dum iu tempo ankaŭ iliaj gefiloj scipovis Eon. En Kriens vigle aktivadis por diversaj Eo-organizoj *Johann Lutz* (+1992) kaj Julietta Parolo (*1922).

La blinda rifuĝinto *Michael Wittenberg* (+1954) aktivis por Eo kun la helpo de sia rusa edzino *Ida Novikoff* (+1976), kiu gvidis Eo-kursojn kaj estis aktiva membrino de SES. Ekde 1950 en Vevey/VD loĝis, kiel rifuĝinto, la blinda Eo-pioniro *Henriko Fischer* (+1960) kun sia edzino.

El Turgovio devenas la tre aktiva Eo-familio *Walder*: edzo/patro →*Otto Walder* (+1988), edzino/patrino *Elsbeth Guggenbühl* (*1919) kaj iliaj filinoj Ruth van Puijenbroek-Walder (*1947), Winterthur/ZH, Verena Chaves-

Walder, Flawil/SG, kaj Monika Schär-Walder, Eppenwil/LU; ĉiuj parolas Eon.



Familio Bickel

Alia interesa ekzemplo de Eo-familio estas tiu de →*Claude Gacond* (*1931) kaj ties familianoj. Lia edzino (ekde 1958) *Andrée Giroud* (*1933) lernis Eon en 1952 samtempe kiel ŝia estonta edzo sub la influo de Edmond Privat, kadre de la porinstruista lernejo en Neuchâtel. Ĉi tiu aktiva Eo-paro mem restis sen infanoj. La fratino de Andrée, *Cosette Sandoz-Giroud* (+2001), lernis Eon en 1956 en La Chaux-de-Fonds; ŝia unua edzo Raoul Cop, kaj ŝia dua edzo André Sandoz same lernis Eon. La patrino de Gacond, *Gabrielle Gacond-Lüscher* (+1999), sekvis Eo-kurson de sia filo kaj poste praktikadis la lingvon en KCE kaj CDELI. Fakte ankaŭ la fratoj de Claude Gacond, Jacques kaj Denis, iom lernis Eon, sed ne daŭrigis la praktikon. La nevino de Claude Gacond, Chantal Perret-Gacond, bone ellernis la lingvon, same ŝia edzo François-Alain fariĝis e-isto. (→Claude Gacond)

Ankaŭ inter la familianoj de →*Marcel Erbetta* (+1996) troviĝis pluraj uzantoj de Eo: la edzino Mariette kaj la filinoj Lucienne kaj Jacqueline kaj du bofiloj partoprenis la Eo-movadon.

La e-istoj *Charles Ecabert* (+1962) kaj →*Michel Frésard* (*1930) estis kuzoj, la neŭŝatelanoj Jean Waldvogel (*1914) en Gorgier/NE estas la nevo de →*Edouard Waldvogel*

(+1994), →*René-William Perrenoud* (+1996) estis la filo de *Louise Perrenoud-Jeanneret* (+1951)

Ankaŭ en la familio *Wenger* el Neuchâtel estis e-istoj: →*Jean Wenger* (+1960) agadis por Eo precipe en la jaroj antaŭ la unua mondmilito kaj poste fariĝis grava urba politikisto. Ankaŭ lia filo Maurice (+1987) iom interesiĝis pri Eo. Jean Wenger estis la onklo kaj Maurice estis la kuzo de *Alfred Wenger* (+2003), kiu multajn jarojn prezidis la neŭŝatelan EG. Ankaŭ lia edzino Liliane Ecklin partoprenis la Eo-vivon.

En Le Locle/NE vivis ĝis la forpaso de la edzo/patro la modela Eo-familio *Edgar Jobin* kaj Mariola Nowak. Jobin, kiu subite mortis en 1998 dum sia feriado en Hispanio, konatiĝis kun sia pola edzino Mariola Nowak dum Eo-kongreso en Hungario. Ilia geedza lingvo restis Eo, dum li rilatis franclingve kaj ŝi pole kun la gefiloj Silvio kaj Varinka.

Alia pol-svisa Eo-familio estas ankaŭ tiu de →*Daniel R. Muhlemann* (*1950), prezidanto de KCE, en Nyon/VD. En 1982 Muhlemann edziĝis kun polino esperantlingva, Barbara Pruchnicka. Dum la gepatroj parolas Eon inter si, kun siaj tri infanoj oni parolas en la pola aŭ franca. Eon la infanoj do lernis nur pasive sen devigo (naturmetodo sen gramatiko). Tio bone funkcias, kiel la patro konfirmis, ĉar ili ĉion komprenas kaj ankaŭ scipoavas paroli la internacian lingvon.



Familio Gacond en 3 generacioj: Gabrielle Gacond-Lüscher, Andrée Gacond-Giroud, Chantal Perret-Gacond

En la neŭŝatela regiono la tradicio de la Eo-familio estas daŭrigata de →*Mireille Grosjean* (*1946) en Les Brenets/NE kaj de ties familio: edzo Yvon (1942-2006) kaj filinoj Marion (*1975) kaj Joëlle (*1978). Laŭ propra priskribo en pritema retforumo, en la familio de Mireille Grosjean Eo estas uzata ne laŭ la

tipa denask-modelo (kie la gepatroj jam sciis Eon antaŭ la naskiĝo de la infanoj kaj tuj parolas Eon kun ili). En la familio Grosjean la interesiĝo de la gepatroj pri Eo aperis kiam la du filinoj Marion kaj Joëlle estis jam ĉirkaŭ 10-jaraĝaj. La Eo-uzado tiam iĝis intensiva, ankaŭ pro multaj engaĝiĝoj en la Eo-movado (KCE, ILEI, JES, TEJO ktp.). Dum la patrino Mireille kaj la filino Marion ofte kaj daŭre uzas la lingvon, Joëlle ne tuj ekuzis ĝin, kvankam ŝi bone komprenis ĝin kaj de si mem komencis partopreni en junularaj Eo-aranĝoj kaj flue paroli la lingvon (nur iom post la aliaj familianoj).

Marion Grosjean vivas en La Chaux-de-Fonds post edziniĝo kun la kanada e-isto *Mario Bélisle* (*1961) kaj havas du denaske Eo-parolantajn infanojn. En la familio *Bélisle-Grosjean* oni uzas Eon laŭ specifa regulo - nomata USUL (unu situacio = unu lingvo). T.e. ke Marion parolas ĉiam en Eo kun la unua filo Romain, kiam ili estas nur du kune (kaj ankaŭ en la urbo, se ili butikumas aŭ vojaĝas buse ktp.). Kiam Mario revenas hejmen, Marion reuzas la francan lingvon, kiu do iĝas tamen la familia lingvo. Romain povas kompreneble paroli kiun ajn lingvon li volas, ĉar ambaŭ gepatroj komprenas kaj la francan kaj Eon. La gepatroj neniam ordonas al li „parolu en Eo!”, aŭ „parolu la francan!” (krom eble se ĉeestas Eo-gastoj). Tiel Romain jam tute nature kaj senprobleme al kutimiĝis je la ŝanĝado inter la lingvoj.



Paro Bélisle-Grosjean

La kernon de la EG en Wil/SG konsistigas (aŭ konsistigis) la pol-devena Eo-familio *Pochanke*: edzo/patro → *Stanislaw Pochanke* (*1934), edzino/patrino Barbara Grzywa (*1944) kaj la tri infanoj Robert (*1970), David (*1971) kaj Veronika (*1975), kiuj deklaris sin denaskaj e-istoj.



Familio Pochanke

En Romandio jam longe aktivas *Lucienne Dovat-Clément* (+1919) en Renens/VD kaj ties filino *Jaqueline Vasserot-Dovat* (*1949) en Pully/VD. Ankaŭ la edzino de *Jean-Jacques Lavanchy* (*1934) en La Tour-de-Peilz, Eliane Purro (*1937), konas Eon. La vaŭda e-isto *Nicolas Greber* (*1962) laboris en KCE antaŭ ol forveturi en 1992 kun sia usona edzino kaj e-istino Bony Fonseca al Arizono. La e-istino Zora Masé (*1955), loĝanta en Onex/GE estas la filino de la internacia konata e-istino → *Anita Altherr-Perić* (*1928), sloven-devena italino kun svisa ŝtataneco. Ankaŭ ŝia edzo Hans Altherr (*1914) estas Eo-parolanto.

Apud Ĝenevo vivas ankaŭ la internacie konata e-ista paro →*Claude Piron* (*1931) kaj *Nicole Piron-Sabathé* (*1934). Ankaŭ iliaj tri filinoj komprenas Eon kaj restis principe favoraj al ĝi, kvankam ili dume ne uzas ĝin. Diversajn kulturajn Eo-aktivecojn organizis en Ĝenevo *Andres Bickel* (*1954) kun sia edzino kaj e-istino *Camille Perrin*, kelkfoje kun la partopreno de la propraj infanoj.

Pluraj anoj de la familio de la iama Eo-muzikistino *Danielle Béguin*, kiu estis la nevino de →*Max-Henri Béguin*, scipovis Eon, tiel ankaŭ ŝiaj patro kaj frato.

En 1991 la zurika e-isto *Dietrich Weidmann* (*1960) edziĝis kun la kuba e-istino *Nélida González Fonseca*. Ili havas du infanojn, kiuj komprenas Eon.



Familio Weidmann-González Fonseca

Inter la membroj de la lucerna EG Eo estas praktikata de multaj jaroj de la paroj *Paul Scherer* (*1933) kaj *Margrit Graber* kaj de *Ernst Brügger* (*1919) kun ties edzino kaj filino.

La lucerna e-istino →*Sonja Brun* (*1930) iam edziniĝis kun la konata brita e-isto *John Catling*, kun kiu ŝi vivis en Bazelo kaj poste en Bristol (Britio).

Carlo Nicolodi (*1940) en Allschwil/BL lernis Eon en la dua duono de la 1960aj jaroj, ĉar ambaŭ gepatroj estis e-istoj. En Berno iam restadis la denaska kolombia e-isto *Augusto Ochoa* (*1942).

En Golden-Hasliberg/BE iam vivis kaj laboris la geedzoj *Gérard Cool* (*1921), nederlanddevena gimnazia instruisto pri matematiko, kaj *Florence Côté* (*1931), denaska kanadanino, kiu oficis kiel A-komitatanino de UEA por Svislando. Okaze de sia pensiĝo, la paro forveturis al Aŭstrio.

La tutmovade konata paro →*Giorgio Silfer* (*1949) kaj →*Perla Ari-Martinelli* (*1938), ital-devenaj e-istoj kun svisa ŝtataneco, loĝas

en La Chaux-de-Fonds kaj estas la mastroj de KCE. *Perla Martinelli* havas Eo-parolantan filinon el sia unua geedziĝo, kiu vivas en Italio.

En Tiĉino multfacete agadis por la planlingva kaj Eo-movado →*Tazio Carlevaro* (*1945) kun la partopreno de ties edzino *Teresita Bozzetta* (*1948). Ilia infano *Eva* (*1974) lernis Eon kiel lernejanino. La avo de *Carlevaro* studis siatempe Eon, kiun li forgesis kaj forlasis, kiam eksplodis la Ido-krizo. Pro tio *Carlevaro* adoptis ankaŭ la lingvon Ido.

Ŝajnas, ke Eo estas reale aplikata nur en F., en kiuj ĉiuj anoj havas la okazon praktikadi Eon. Kiam nur la patro estas praktikanto, la familio riskas eks-esperantistiĝi. Same okazas ekzemple en F., en kiuj la anoj formigras al alia lingvoregiono, perdante la kontakton kun e-istoj.

→Virinoj

Maurice FAVRE

1922. Loĝas en La Chaux-de-Fonds NE



Post la lernejoj kaj la gimnazio en La Chaux-de-Fonds/NE, la studado en la juraj fakultatoj de la universitatoj en Neuchâtel kaj Bazelo kun licencio pri juro (1943), F. fariĝis advokato (1946) kaj notario (1954). Kiel specialisto pri la juro pri geedziĝaj, impostaj kaj malsan-asekuraj aferoj F. plenumis la funkciojn de instru-juĝisto, prezidanto de la regiona tribunalo kaj ĝenerala prokuroro. Kiel membro kaj prezidanto (1957-70) de la radikala partio de la neŭŝatela kantono F. apartenis al la urba konsilio de La Chaux-de-Fonds (1948-79) kaj al la granda konsilio de la neŭŝatela kantono (1949-79). En 1962 li estis membro de la direkta komitato de la radikala

partio de Svislando kaj en 1985 kandidato por la svisa parlamento (malgranda ĉambro). Lige kun siaj profesiaj okupoj kaj politikaj aktivecoj F. verkis manifeston por liberala kaj respondeca moralo rilate la aborton (1977) kaj la 'scenaron 2035', kiu entenis pledon por pozitiva evoluo de la agrikulturo (1983).

Kvankam F. neniam estis tipe aktiva Eo-movadano, li ĉiam rilatis tre favore al Eo, kiun li diskonigis en la rondoj de la radikala partio. Kiel jura konsilanto li kunlaboris kun Kooperativo de →Literatura Foiro en ties administra komitato, kaj li estis dekomence membro de la fonduma konsilio de →Gastejo Edmond Privat (GEP), kies statutojn li helpis ellabori, ĉiam senpage kaj honorofice disponigante siajn jurajn kompetentecojn.

→Kooperativo de Literatura Foiro

→Gastejo Edmond Privat

LA FENOMENO SVISLANDO (libro)

Libro originale verkita en Eo de la zurika ĵurnalisto kaj e-isto →Arthur Baur (*1915) kaj eldonita okaze de la 64a UK en Lucerno en 1979. La 144-paĝa libro estis redaktita de Baur surbaze de liaj radioprelegoj, kiujn li disaŭdigis dum jaroj tra la kanaloj de Svisa Radio Internacia (→Radio), kun kiu li kunlaboris ekde 1947. Laŭ propra celpriskribo, la libro provis klarigi al la legantoj, kial Svislando estas tiel komplika, kiel ĝi ekestis kaj kiamaniere ĝi evoluadis al sia hodiaŭa stato, historie, politike, ekonomie kaj kulture kaj kiuj estas la aktualaj problemoj. Inkluzivita estas ankaŭ ĉapitro pri la historio de Eo en Svislando. La libro, kiu aperis en eldonkvanto de 5000 ekzempleroj kaj kiu estis donacita al la kongresanoj, ricevis ŝtatan subvencion de la Kunordiga komisiono por la prezentado de Svislando en eksterlando (en Berno), kiu posedas la kopirajton de la libro. F. estis presita de Ziegler Druck- und Verlags-AG en Winterthur kaj distribuita de SES en Romanshorn/TG (Otto Walder). La bildojn disponigis la Svisa turisma centralo en Zuriko. Konsiderata en eksterlando kiel prestiĝa kaj enhave interesa publikaĵo, F. estis plene tradukita en la polan lingvon de Wojciech Usakiewicz (*Szwajcarski fenomen*) kaj aperis en la renoma ĉeldonejo Wiedza Powszechna en Varsovio. Ĉerpaĵoj el la verko aperis an-

kaŭ bulgarlingve en iu bulgara periodaĵo.

→Arthur Baur →Svislando



La Fenomeno Svislando en Esperanto kaj en la pola lingvo

FERVOJISTOJ

Inter aliaj profesi-fakaj branĉoj ankaŭ la F. apartenas al la fruaj pioniroj de la Eo-movado, kompreninte ĝiajn avantaĝojn por la internaciaj rilatoj inter la F. kaj pro la utileco de Eo en vojaĝado kaj turismo.

Kadre de unuaj klopodoj por vekti intereson pri la zamenhofa lingvo ĉe Eo-F. en 1909 estis fondita *Internacia Asocio de E-istaj F.* (IAEF), la praorganizo de IFEF. Post kelkaj jaroj IAEF registris 227 membrojn en 15 landoj, sed la minacanta unua mondmilito ruinigis la promesplenan starton. Nur dum la 13a UK (Prago 1921) IAEF estis restarigita.

Fondo de SAEF: Post la milito la amaskomunikiloj ne malofte skribis pri la neŭtrala universala lingvo. Tiam ne nur Eo, sed ankaŭ ĝia konkuranto Ido estis forte propagandata. Malgraŭ la strebado de la idistoj influo la fervojistajn mediojn, la kongreso de la *Svisa Fervojista Sindikato* (SEV), okazinta en 1922, post diskuto pri la planlingva demando, donis la preferon al Eo. La gazetara alvoko de →Jules Perlet (1887-1964) al ĉiuj scipovantoj de Eo aŭ simpatiantoj de la Eo-movado rezultigis la fondon de *Svisa Asocio de Eo-F.* (SAEF), la 16an de septembro 1925 en Berno. La unua estraro de SAEF konsistis el Jules Perlet kiel prezidanto, vicprezidanto Emil Zuberbühler (1899-1987), stacidoma oficisto ĉe la fervojo Bodensee-Toggenburg


en Herisau/AR, sekretario *Hans Zeindler*, dungito de la fervojo Bern-Lötschberg-Simplon (BLS) en Berno, kaj kasisto *Adolf Ernst*, oficisto de la ĝenerala direkcio de la svisaj fervojoj SFF (SBB/CFF) en Berno. Dank' al la interesiĝo de la ĝenerala direkcio de SFF pri la ekzisto de SAEF, en 1925/26 en Berno efektiviĝis subvenciitaj Eo-kursoj por la dungitoj de la SFF-direkcio. Eo do konkeris la statuson de instruata lingvo samrange kun la ceteraj lingvoj. Aliaj kursoj disvolviĝis en Laŭzano kaj Renens/VD. Precipe *William Perrochon* (1899-1947), sekretario ĉe la ĝenerala direkcio de SFF, poste ĝia revizoro, → *Jules Freymond* (1888-1978) kaj *Charles Baumgartner* fervore dediĉis sin al tiu organizo. Kun Perrochon k.a. Freymond formis la grupon *Razude* en Laŭzano, kiu estis la kerno de SAEF. Freymond ankaŭ prizorgis la montrofenestron de SAEF en la laŭzana stacidomo kaj aperigis artikolojn pri Eo en la franclingva sindikata fervojista gazeto *Le Cheminot*, en kiu en 1927/28 speciala Eo-kurso estis publikigita. En 1926 SFF eldonis malgrandan mapon pri Svislando kun Eo-teksto en eldonkvanto de dekmil ekzempleroj, kaj la fervojo Bern-Lötschberg-Simplon (BLS) eĉ publikigis propran Eo-prospekton (vd. ĉi-sube).



Fervojaj prospektoj en Esperanto

Ido-krizo: Kiel menciite, tiutempe oni sentis la fortan propagandan premon de la idistoj. La nomita SEV-kongreso de 1922 donis la okazon por ardaĵaj disputoj inter e-istoj kaj idistoj, ĉar en SEV membris reprezentantoj de ambaŭ planlingvoj. Reage al la fonda de SAEF kaj de ties subteno far la ĝenerala

direkcio de SFF, la idistoj publikigis polemikajn artikolojn en la sindikata gazetaro kontraŭ Eo kaj sukcesis starigi malgrandan societeton. Tiu situacio kaŭzis ian konfuzon ĉe la F. Ĉiuj duboj estis forigitaj, kiam la SEV-kongreso en 1926 en Berno proklamis la superecon de Eo rilate al ĉiuj aliaj planlingvaj projektoj kaj rekomendis lerni la zamenhofan lingvon. Malgraŭ tiu decido la idistoj, kiel SEV-membroj, daŭre rajtis aperigi siajn kolumnojn en la sindikata gazetaro, sed devis eviti polemikon. Iom post iom Ido senbrue malaperis de la fervojista scenejo.



Internaciaj rilatoj kaj kunlaboro kun SES: Ekde la komenco SAEF kunlaboris kun IAEF, kies sidejo troviĝis en Zagrebo, Jugoslavio. Ĝia gazeto *La Fervojisto* estis samtempe la oficiala organo de SAEF. Pro la malregula apero de tiu periodaĵo ekestis malkontento inter la membraro; en 1929 SAEF decidis ekŝigi el IAEF, ĉar oni opiniis, ke la pagitaj kotizoj ne estas sufiĉe rentodonaj. Alternative SAEF apogis la agadon de *Internacia Transportlaborista Federacio* (ITF) en Amsterdamo. Post la disfalo de IAEF, SAEF serĉis pli firman kontakton kun *Svisa Eo-Societo* (SES), al kiu 1931-36 SAEF estis aliĝinta kiel kolektiva membro. Malgraŭ tio oni sentis, ke la internacia tegmento mankas. Dank' al la helpo de ITF en 1931 estis fondita en Vieno nova internacia asocio kun la nomo *Internacia Federacio de e-istaj trafik- kaj transport-laboristoj*

(IFETT). De la sukcesa unua internacia fervojista kongreso en 1932 en Prago, organizita de IFETT, la svisoj, inter ili → *Hermann Schmutz* (1896-1993), revenis entuziasmaj kaj por ĉiam restis ligitaj al SAEF. Aliaj pioniroj kiel *Georges Berger* el Biel-Bienne/BE dum 1930-31 estis kasisto kaj sekretario de SAEF, *Fritz Hugi* en Laŭzano 1930-32 servis al SAEF kiel ĝia vicprezidanto, kaj *Ernst Grimm*, kiu kiel William Perrochon kaj Adolf Ernst (unua kasisto de SAEF en 1925-30) laboris kiel oficisto de la ĝenerala direkto de SFF en Berno, sekvis lin en la ofico de vicprezidanto ĝis 1944. Fritz Hugi (1901-75), SAEF-ano ekde 1926, aktivis ankaŭ en la abstina movado kaj iniciatis laboristan fondaĵon por la t.n. sociala loĝejkonstruado. *Ernest Hersberger* el Laŭzano en 1930 estis elektita kiel SAEF-asesoro. Pliaj kolegoj el la pionira tempo de SAEF nomiĝis *Henri Martin* kaj *Arthur Pahud*. (→Vaŭdo)



Jules Freymond



Renkontiĝo en marto 1929 kun Fritz Hugi, William Perrochon, Eric Ericson (sveda parlamentano), Henri Martin kaj Jules Freymond (de maldekstre)

Nova krizo, dua mondmilito, rekomenco kaj fondo de IFEF: Sub la influo de la ekonomia krizo de la fino de la 1920aj, komenco de la

30aj jaroj, en 1932 la SFF-direkto nuligis la statuson de la samrajteco de la Eo-kursoj por F. kun la argumento, ke „Eo kiel monda helplingvo ne atingis la disvastiĝon, kiun oni komence atendis de ĝi“. La nombro de la SAEF-membraro stagnadis inter 40 kaj 50 ĝis la dua mondmilito, kaj en 1937 SAEF ŝanĝis sian nomon al *Svisa Amikaro de Eo-F*. La eksplodo de la dua mondmilito ĉesigis ĉiujn internaciajn rilatojn kaj silentigis la lokajn movadojn. Ankaŭ la fervojista Eo-movado ne plu posedis internacian organizon. En neŭtrala Svislando, kiu feliĉe ne estis trafita de la milito, la F. estis troŝarĝitaj per malfacila deĵoro kaj apenaŭ plu trovis libertempon. Dum la ‘malhelaj jaroj’ la ŝipeto estis tirata de *Emile Haudenschild* el Berno, kiu laboris kiel oficisto de la fervojista sindikato SEV kaj estis prezidanto de SAEF inter 1932 kaj 1944.



Henri Martin, Emile Haudenschild kaj William Perrochon (de maldekstre) en majo 1934 en Biel-Bienne.

En 1944 estis elektita nova estraro kun *Georges Renaud* el Biel-Bienne/BE, kiu prezidis la asocion jam en 1930-32 por estri ĝin denove ĝis 1950. La novaj gvidantoj provis revigligi la movadon, invitante la membrojn rekomenci la internacian korespondadon kun landoj, kie tio jam eblis. Baldaŭ la Eo-organizoj refondiĝis en preskaŭ ĉiuj landoj. Kiam en 1947 estis aranĝita la unua postmilita UK en

Berno, ankaŭ kelkaj SAEF-anoj, inter ili →*Otto Walder* (1912-88), kunhelpis en ĝia organizado. En aŭgusto 1948, okaze de la internacia kongreso de SAT en Amsterdamo, estis starigita *Internacia Fervoja Eo-Federacio* (IFEF). Post tiu evento *Emil Keiser* (1889-1962), kiu same kiel *Otto Walder* oficis kiel LKK-ano de la 32a UK en Berno, retransformis kun →*Hans Bipp* (1913-97) la SAEF-Amikaron al vera asocio.




Emile Haudenschild kaj Emil Keiser

Emil Keiser, kiu lernis Eon en 1939 kaj kiu estis LKK-ano de la 32a UK (Berno 1947), persone ĉeestis la fondon de IFEF en Amsterdamo. Li plenumis en SAEF la funkciojn de sekretario (1944-50), prezidanto (1950-52) kaj vicprezidanto (1952-56), krome li estis la unua Eo-asesoro de UAISF (1954). Iom post iom la membraro kreskis: de 32 en 1952 al 60 en 1956. Kiel kasisto de SAEF inter 1946 kaj 1950 rolis *Hans Kessler*. Alia aktiva SAEF-ano ekde 1957 estis la trajnestro *Heinrich Amman* (1909-67), kiu servis al la asocio kiel asesoro kaj kaskontrolanto.


La centro de la svisa fervojista Eo-movado, kiu antaŭmilite troviĝis en Romandio, ĉefe Laŭzano, nun ŝoviĝis al nordorienta Germanio (Zuriko, Argovio). Aperis la ideo, ke en diversaj grandaj stacidomoj oni metu monstroketetojn por atentigi la preterpasantojn pri la ekzisto de la Eo-movado. Ekzemple en la stacidomo de Lucerno tia vitrineto estis prizorgata de lucernaj Eo-F. (ĉefe de *Johann Lutz* kaj *Konrad Rey*) kaj ekzistis ĝis la malkonstruo de la malnova konstruaĵo en 1999.

Klerigo kaj kongresoj: De 1932, kiam la direkto de SFF ĉesigis subvencii la Eo-

kursojn, SAEF ne plu oficiale rilatis kun la centra fervoja administracio, kvankam la regionaj direktoj volonte disponigis al la e-istoj ejojn por iliaj kunvenoj kaj kursoj. Intertempe en eksterlando ekestis kaj evoluis la artaj kaj intelektaj fervojistaj societoj, al kiuj aliĝis ankaŭ la e-istoj. La fondon de *Internacia Federacio de Societoj de Fervojistaj Artistoj kaj Intelektuloj* (FISAIC) en 1953 sekvis la postan jaron la starigo de ĝia *svisa sekcio* UAISF (franclingve: UAICS, germanlingve: VKES). Al ĝiaj unuaj estraranoj apartenis *Emile Birbaum* kiel prezidanto, *Hans Bipp* kiel vicprezidanto kaj *Emil Keiser* kiel asesoro. De tiam establiĝis denove pli firmaj rilatoj kun la direkto de SFF, ties personara sekcio kaj ankaŭ kun la SEV-sindikato. La aktiva kunlaboro inter SAEF kaj IFEF (aliĝinta en 1953 kiel faka asocio al UEA) unuflanke kaj la bonaj rilatoj inter SAEF kaj la naciaj fervojaj instancoj aliflanke kondukis i.a. al la organizado de du IFEF-kongresoj en Svislando: la 7a IFEF-kongreso en 1955 en Zuriko kaj la 24a IFEF-kongreso en 1972 en Lugano. La kongresoj ricevis subvenciojn i.a. de la SFF-direkto kaj la SEV-sindikato kaj ĝuis la atenton flanke de la urbaj aŭtoritatoj de Zuriko kaj Lugano.



Edo Tognini, Otto Walder kaj Johann Lutz



Hans Bipp, Hans Hunkeler kaj Kurt Greutert

Al la LKK de la zurika IFEF-kongreso apartenis *Hans Bipp* kiel prezidanto, *Otto Walder* kiel vicprezidanto kaj *Walter Sonderegger* (1909-82) kiel sekretario. Sonderegger rolis kiel sekretario de SAEF (1950-59), poste restis kiel asesoro kaj komisiito daŭre je la dispono de SAEF (1959-72). Krome li estis UEA-fakdelegito pri fervojoj kaj SAT-ano en Zuriko. *Hans Noll* (1903-92), stacidoma oficisto en Wallisellen/ZH, estis la kasisto de ĉi tiu LKK kaj de SAEF mem (1952-72); li estis SAEF-membro entute dum pli ol 50 jaroj!



Hans Noll kaj Konrad Rey

La kongreso en Lugano estis organizita ĉefe de la tiĉinaj samideanoj, kiuj en la 1950-60aj jaroj funkciigis la SAEF-grupon en Bellinzona kaj grandan parton de la tiĉina movado mem: *Edo Tognini* (*1927), prezidanto, *Fernando de Faveri* (*1926), vicprezidanto, → *Kurt Greutert* (*1927), sekretario, *Giovanni Sasselli* (1904-72), helpsekretario, kaj → *Ernst Glättli* (*1924), kasisto. Entute 660 personoj el 18 landoj, inter ili 550 F., partoprenis tiun IFEF-kongreson, kiu disvolviĝis en Padiglione Conza en la centro de tiu sudsvisa turisma urbo kaj restis memorinda kiel „luma momento“ en la historio de IFEF, kiel la Eo-gazetaro poste raportis.

Kun Greutert, de Faveri, Sasselli kaj Tognini menciindas ĉi-loke ankaŭ la lokomotivestroj *Enea Albertini* (1926-90) kaj *Enrico Balmelli* (*1917), kiuj formis la anaron de SAEF en Tiĉino kaj kunmotoris ankaŭ la starigon de Tiĉina Eo-Ligo. (→ Tiĉino)

Dum la kongreso de Svisa Fervojistaj Sindikato (SEV) en 1964 en Interlaken, partoprenata

de 800 personoj, kaj en ĉeesto de oficialaj reprezentantoj de politikaj kaj fervojistaj instancoj kaj de la gazetaro, estis traktita rezolucipropono rilate la enkondukon de Eo en la lernejojn, kiu tekstis jene: „La Estraro de SEV estu komisiata agi tra la Internacia Transportlaborista Federacio, aŭ la Svisa Sindikata Unuiĝo kaj la Internacia Asocio de liberaj sindikatoj, por ke Eo estu enkondukita kiel deviga lerneja fako en ĉiuj landoj de Eŭropa Ekonomia Komunumo kaj de Eŭropa Asocio por libera interŝanĝo.“ La koncerna komisiono favoris tiun proponon, sed ne sentis sin kompetenta pri ĝi kaj pluŝovis ĝin al la Internacia Transportlaborista Federacio.



Enrico Balmelli, Giovanni Sasselli kaj Enea Albertini



Johannes Jüstrich kaj Werner Schaufelberger

Revuo *Svisa Fervojisto*: De la fino de la dua mondmilito la estraro kaj membraro de SAEF estis interligitaj per laŭbezonaĵaj cirkuleroj. Propra, regula periodaĵo ankoraŭ mankis. Dum kelkaj jaroj la SAEF-anoj ricevis la bultenon *La Interligilo* el Francio, kaj IFEF liveris la informojn tra *La Internacia Fervojisto*, kiu ekaperis en 1949. Laŭ interkonsento kun SES, en ĝia organo *Svisa Espero* (redaktita de la fervojisto Otto Walder) de 1951 estis rezervita SAEF-paĝo, ĉar multaj SAEF-anoj membris samtempe en SES. Aliaj asociaj


informoj aperis en la nacilingvaj organoj de SFF kaj UAISF. Kvankam ĉio ĉi estis tre ĝojiga, ĝi ne povis plene kontentigi la SAEF-anojn. Tial en 1958, kiam *Heinz Sandmeier*, UEA-delegito en Zuriko, prezidis SAEF, Kurt Greutert lanĉis la informilon *Svisa Fervojisto*. 1960-65 la revuon redaktis la lucerna SFF-inĝeniero *Reinhard (Rinaldo) Albus* (1928-82), kaj dum multaj jaroj ĝi estis presita de la grizon-devena fervojisto *Johann Lutz* (1923-92) en Kriens/LU. Alia tre verva lucerna Eo-fervojisto, *Emil Gehring* (1895-1987), oficis kiel SAEF-vicprezidanto de 1966 ĝis 1969.



La gazeto de SAEF – *Svisa Fervojisto*

Eŭropa Feria Semajno (1959-77): Baldaŭ alia grava agado de SAEF ekfuroris inter estoj. En 1959 unufoje okazis *Eŭropa Ferial-Semajno* (EFS) sub la aŭspicio de SAEF kaj IFEF, de 1975 ankaŭ de VKES. Ĝiaj organizantoj estis unuavice la trajnestro → *Hans Hunkeler* (1920-2000), kiu pli ol 25 jarojn aktivis en SAEF (1958-66 vicprezidanto, 1966-73 prezidanto) kaj kiu redaktis la bultenon *Svisa Fervojisto*. Al la kursoj de EFS, kies celo estis altigi la lingvo-nivelon de la estaro, enhance kontribuis la ne-F. → *Paul Bächli* (1901-95) kaj → *Fritz Liechti* (1913-

2001), de 1967 helpis ankaŭ kolego → *Ernst Glättli* (*1924). Komence modesta aranĝo kun trideko da personoj kaj kun ripoza, distra kaj turisma karaktero, EFS evoluis al nemankebla internacia manifestaĵo. De 1971 ĝi estis kompletigata de tri diversgradaj lingvo-kursoj matenaj, kun jare entute 80-100 partoprenantoj el deko da landoj. La stacioj de tiuj ferio-semajnoj estis Herzberg/AG, Oberbal-mberg/SO, Boldern/ZH, Gwatt/BE, Füren/NW, Caslano/TI, Magliaso/TI kaj Wengen/BE. Escepte de la kongresa jaro 1972, EFS okazis regule kaj lastfoje en 1977. Kelkaj el la menciitaj EFS-aktivuloj cetere revenis en 1979 por deĵori ankaŭ kiel LKK-anoj de la 64a UK okazinta en Lucerno en tiu memorinda jaro.



Ekde 1973 SAEF ricevis en la persono de *Gertrud Eggenberger* (*1925), iama komerca sekretariino loĝanta en Winterthur, tre aktivan, kompetentan kaj lojalan kunlaboranton. Eggenberger lernis Eon en 1958/59 per la koresponda kurso de la fervojsindikata gazeto *Der Eisenbahner*. Depost 1973 ŝi engaĝiĝis unuavice en la fervojista Eo-movado, kiel estraranino de SAEF, de 1980 kiel ĝia prezidantino. De 1978 ŝi redaktis la revuon *Svisa Fervojisto*. Krom tio ŝi tradukis fakajn artikolojn el Eo en la germanan lingvon kaj inverse, uzante la fervojan fakterminaron (suplemento al la seslingva *Lexique général des termes ferroviaires* de Internacia Fervoja Unio). En 2004 IFEF distingis ŝin per la honora membreco. Estis ankaŭ Eggenberger kaj Glättli, kiuj daŭrigis la asocian aktivecon de SAEF precipe kadre de la regula aranĝo nomata *Gaja Eo-Rondo Instruiteca*

(GERI), kiu estis iniciatita de Otto Walder en 1980.

Alia aktiva Eo-fervojesto nomiĝis *Johannes Jüstrich* (1906-88) el St. Gallen.



Gertrud Eggenberger kaj Ernst Glättli

La 25an de marto 1995 SAEF festis sian 70-jaran jubileon en la stacidoma bufedo de Lucerno. La membronombro de SAEF fine de 1996 estis 115. Per la eliro de *Ernst Rohner*, emerita maŝina teknikisto en Schlieren/ZH, kiu 1969-96 plenumis la oficon de kasisto, kaj de *Werner Schaufelberger* (1916-98), lokomotivestro el Zuriko, membro de SAEF de 1958, UEA-fakdelegito pri fervojoj kaj ekspedito de *Svisa Fervojisto* (1984-96), la asocio perdis du fortajn pilierojn.


Malfondo en 2004: SAEF estis malfondita dum la ĝenerala kunveno en Rotkreuz/ZG la 3an de aprilo 2004 kun valideco por la jarfino 2004. La decidon alprenis unuanime 15 restintaj membroj. Kvankam SAEF registris formale 88 membrojn (diversaj kategorioj), la ĉefa motivo por la likvido estis la nekapablo trovi posteulojn por la estraraj oficoj. Fiaskis ankaŭ la klopodoj trovi la kontakton kun junaj fervojistoj, kiuj povus pluporti la torĉon. La protokolo de la malfonda kunveno estis publikigita en *Svisa Fervojisto*, n-ro 193. Per la sinsekva malapero de la finna, sveda, hispana, nederlanda kaj svisa asocioj, la internacia Eo-movado fervojista do ricevis bedaŭrindan malfortiĝon.

FILATELO

Speciala poŝtstampo estis eldonita de la svisa poŝto okaze de la 31a UK en Berno en 1939. La unua kaj sola oficiala poŝtmarko eldonita de la svisa poŝto kun la valoro de 70 centimoj realiĝis en 1979 okaze de la 64a UK en Lucerno. Ĉi tiu poŝtmarko, kiu validis por sendi poŝtkarton al eksterlando, portis la motivon de la unua Eo-balono en la mondo, kiu estis lanĉita en 1776. Tiuokaze aperis ankaŭ specialaj unuatagaj kartoj, kovertoj kaj stampo. En 1979 estis ankaŭ fondita la svisa filatela servo, precipe dank' al la klopodoj de →*Fritz Liechti* (1913-2001), fervora zurika e-isto.



Svisa Eo-poŝtmarko de 1979



Unuataga koverto eldonita okaze de la 64a Universala Kongreso de Esperanto en 1979



Oficiala poŝtstampo okaze de la UK 1939